

MEDITADO

surbaze de la Evangelio laŭ Sankta Johano (19:25-27) kaj la Agoj de la Apostoloj (1:12-14)

Ni preĝu al la Sankta Spirito, Spirito de la Graco kaj Vero, ke Li plenu nin per la Saĝeclumo kaj Gracofontoj, por ke ni komprenu ĝuste la Dian parolon kaj volu fervore plenumi la Dian volon. La Plejsankta Virgolino Maria gvidu nin al sia Filo Jesuo.

Jesuo post sia resurekto preparis la disĉiplojn al iliaj devoj. Li diris al ili pri sia ĉieleniro kaj pri alveno de la Sankta Spirito, Konsolanto, kiun Li sendos al ili kaj kiu re-memorigos la tutan instruadon de Jesuo, donos al ili forton, kuraĝon, bravecon, por ke ili povu sentime prediki la Evangelion.

Kaj post kvardek tagoj de la resurekto Jesuo ĉieleniris. Post kvindek tagoj de la resurekto, alidirite en la tago de Pentekosto, kiam ĉiuj disĉiploj de Jesuo kaj piaj virinoj kun Maria, Patrino de Jesuo, troviĝis kune en la sama loko - en la Vespermanĝejo - subite el la ĉielo aŭdiĝis sono kvazaŭ blovego de forta vento, kaj ĝi plenigis la tutan domon, kie ili estis. Tiam ili vidis ion, kiel fajrajn langojn, kiuj disiĝis kaj venis sur ĉiun el ili. Ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito kaj komencis paroli en aliaj lingvoj, kiel la Spirito donis al ili parolkapablon (Ago 2:2-4).

La Sankta Spirito estas fajro, kiu vekas en la homo ardon, fervoron, pasion - varmegan amon al Dio, al homo - la entuziasman amon, kiu scipovas renovigi la vizaĝon de la tero. Dum la unua pilgrimo al Patrujo, nia karega papo Johano Paŭlo la Dua (Granda) vokis en Varsovio sur la Placo de la Venko: "Descendu Via Spirito! Descendu Via Spirito! Kaj Li renovigu la vizaĝon de la Tero, de ĉi tiu Tero!" Lia entuziasma amo altiradis al Dio multnombrajn junularon, grandajn homamasojn.

Kaj ĉu ni preĝas al la Sankta Spirito, ke Li donu al ni bonajn inspirojn, fervoran amon al Dio, al la homo, por ke ni prediku la Evangelion ne nur per la vortoj, sed antaŭ ĉio per la agoj?

Por ke nia vivo estu sankta, plena de la fervora amo al Dio, al la homo, Jesuo donis al ni sian Patrino, kiel nian Pledantino, Perantino, Konsolantino. En la Evangelio laŭ Sankta Johano ni legas: Apud la kruco de Jesuo staris:

Lia Patrino kaj la fratino de Lia Patrino, Maria, la edzino de Klopas, kaj Maria Magdalena. Jesuo, rigardante sian Patrino, kaj la apud starantan disĉiplon, kiun Li amis, diris al sia Patrino: Virino, jen via filo! Tiam Li diris al la disĉiplo: Jen via Patrino! Kaj de post tiu horo la disĉiplo akceptis Ŝin en sian domon (Joh 19:25-27).

Kaj ni, ĉu ni akceptas la Plejsanktan Virgulinon al niaj hejmoj? Ĉu ni rifuĝas sub Ŝian ŝirmon? Ĉu ni petas ke Ŝi redonu nin al sia Filo Jesuo? Se ni partoprenas la Helmontan Apelon pere de Radio Maria, tio signifas, ke spirite ni estas en la domo de nia Patrino kaj Reĝino kaj povas aŭskulti, kion Ŝi parolas al ni. Kaj ni feliĉas, ĉar nia kara Patrino ĉiam nin gvidas al sia Filo Jesuo. Al Li estu senĉesa dankemo pro Lia kompatema Koro, pro la Gracofontoj, kiuj fluas el la mistero de Eŭkaristio, en kiuj povas enprofundiĝi kaj esti feliĉa ĉiu Diinfano.

Post la venko kontraŭ Svedoj, post la mirakla defendo de la Hela Monto, defendo danke al Maria, la pola reĝo Johano Kazimiro proklamis, ke Maria estas Reĝino de Pollando. Tio okazis en la katedralo de Lvovo antaŭ la mirakla bildo de Dipatrino Favora, la unuan de aprilo de 1656.

La kronado de Maria sur la bildo de Ĉenstoĥova Madono per la papaj kronoj okazis la 8-an de septembro de 1717. En la jaro 1920 papo Benedikto la 15-a proklamis, ke la 3-an de majo estas la eklezia festo de la Reĝino de Pollando. De tiam la 3-an de majo okazas la eklezia festo kun la festo ŝtata nacia de la Konstitucio de la Tria de Majo. Tiu konstitucio, la unua en Eŭropo, estis proklamita 3.05.1791.

La feston patronas
la plej Sankta Maria -
nia Patrin' kaj Reĝino.
Ni ekstaru sub standardojn Ŝiajn
kaj aŭskultu konsilojn Patrinajn.
Maria regu kaj zorgu la polan nacion!
Ŝi fortigas en niaj animoj
la kredon, amon kaj esperon,
kiuj atestas por tempo ĉiama,
ke ilin ne elŝiros agado satana.

("La Trian de Majo", Z.K.)

Prilaboris Zofia Kamieniecka